# EKO 2025

**Familioj fokusite**

EKO 2025-21. Majo 19. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 300 KB

## Familiaj valoroj laŭ UN




La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas *Familio-celaj politikoj por daŭripova evoluigo*. Per tiu temo, Unuiĝintaj Nacioj instigas registarojn de la mondo integri familiojn en siaj evoluigaj tagordoj por trakti gravajn temojn kiel ekzemple teknologia transformado, demografiaj ŝanĝoj, urbigo, migrado kaj klimata ŝanĝiĝo. Ĝenerale, familioj transdonas valorojn al novaj generacioj. Tiel, ni bezonas ke familioj transdonu valorojn kiel socian justecon, daŭripovecon, naturan konservadon, klimatan ekvilibron, kaj aliajn gravajn elementojn por nia komuna estonteco. En sia eduka rolo, familioj konservas kaj disvastigas lingvojn kaj inspiras ilin al siaj infanoj.

Fonto: Gazetara komuniko de UEA

## UEA survojas al nova strategia plano

La prezidanto de UEA, Duncan Charters, aperigos artikolon en la junia revuo *Esperanto,* kiu celas gvidi la Asocion al nova plano por la venonta estraro. SMG pledis por la formulado kaj publikigo de nova plano. Reage Duncan respondis al mi kaj aliaj: "La malneto kiun mi publikigos dependas de kontribuoj en enketoj, kunsidoj kaj korespondado dum la pasintaj jaroj, kaj  povos servi kiel deirpunkto por la nova Estraro, kiu sin sentu tute libera utiligi la jam faritan laboron laŭ sia bontrovo por ellabori propran strategion.  Mi resumos kie ni troviĝas nun en revuo *Esperanto* kaj en la trijara *Almanako*, kiu finpretiĝas por eldono jam ĉi-jare.  Tio almenaŭ estos ĝisdatigo de la malnovaj planoj, kiuj restas daŭre memorigindaj kaj konsultindaj.  La ĉefa celo de la nuna estas ĉion koncizigi por ke oni efektive legu la dokumenton kaj ĝin facile komprenu kiel bazon por estonta agado.  La realigo dependos de trovado de fidindaj gvidantoj de komisionoj kaj laborgrupoj por ĉiuj konkretaj celoj.  Tio montriĝis defia en la pasinteco, tamen sen tiu fortostreĉo malfacilos progresi laŭ la deziroj de la membraro.  Precize pro tio mi alvokis ĉiujn komitatanojn kaj membrojn elekti unu specifan agadon por subteno.  Se tio okazos, ni sukcesos.  Vi vidos la ellaboron de tiu celo en la junia artikolo.




## Sorĉa literaturo

Antaŭ 125 jaro aperis unu el la plej popularaj libroj de la porinfana literaturo: La mirinda sorĉisto de Oz. Dum la tuta majo UEA ofertas la du Esperantajn versiojn kun sesona rabato sendepende de la mendata kvanto.

## Renoma hispanino laŭdata pro porpaca laboro

Rafaela Urueña – Porpaca agado en Unuiĝintaj Nacioj
Prezentita en la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso – Sorio.
https://youtu.be/9ipRuasDPD0

## Dua kaj tria hispanaj virinoj en Sorio

Klarisa kantis sian kanton *En mia vivo,* en la Hispana Esperanto-Kongreso ĵus okazinta en Sorio: https://youtu.be/PF7MbdQlzwA

Ana Manero prezentis sian dulingvan libron *Maruja Mallo* en la hispana kongreso en Sorio: https://youtu.be/JGP7Kt3B1M8

Miguel Fernández deklamas la 7-an poemon de Gustavo Adolfo Bécquer
https://youtu.be/shRs02_L2to

ĉiuj eroj de mga

## Partoprenu en la dua Filipina Junulara Renkontiĝo (FAJRO)!




Ekde 2024, FAJRO estas la ĉefa renkontiĝo organizata de Filipina Esperanto-Junularo (FEJ). En 2025, ni decidis okazigi la 2-an FAJRO de la 22-a ĝis la 24-a de aŭgusto, ĝuste unu semajnon post la IJK 2025 en Indonezio, por profiti de la ĉeesto de samideanoj el diversaj mondopartoj, kiuj tiam estos en Sudorienta Azio. Se vi havos tempon post la IJK, pluvojaĝu al Filipinoj, malkovru nian landon, kaj konatiĝu kun filipinaj samideanoj en semajnfina aranĝo proksime de la marbordo.

**Albert Stalin T. Garrido**

## Muzea vizito en BET 59

Ĉi-jare estos festita la 150-jariĝo de la mondfama litova pentristo kaj komponisto Mikalojus Konstantinas ČIURLIONIS. En *Kaunas* estas muzeo de lia nomo dediĉita al li, kie estas eksponata lia tuta verka heredaĵo. Partoprenantoj de BET-59 estas invitataj viziti la muzeon kaj konatiĝi kun li. Artikolo pri li kaj lia kreado estas ĉi-tie: https://sezonoj.ru/2025/05/bet-193/

## AMO en perspektivo



Okazis jam en februaro en Zagrebo, Kroatio, la unua AMO-seminario por la jaro (numero 112). Fluas diskutoj pri seminario en la Kongreso de ILEI julie en Beogrado kie tre aktualas la temo pri Artefarita Intelekto (AI). Seminario pri AI en edukado tre bonvenos. Certa estas seminario dum la UK en Brno kadre de la Tago de Lernado prizorgota de Marija Belošević (en la bildo), la plej aktiva membro de la AMO-komisiono. Ŝi gvidos la tradician novembran seminarion en Kroatio kun literatura temo. Planata estas AMO-seminario en iu Afrika lando decembre. Ni sondas pri la eblo de seminario en Pollando.

## Medicinistoj kune en Litovio

Jen alloga informo kaj alvoko de la 23-a IMEK, kiu okazos de la 28-an de junio ĝis la 5-a de julio 2025 en la Litovia Universitato de Sansciencoj (LSMU), *Kaunas*. Partopreni la kongreson estas invitataj ĉiuj, kiuj havas ligojn kun sansciencoj: kuracistoj, flegistoj, bestokuracistoj, specialistoj pri nutradsekureco, apotekistoj ktp. La kongreson organizas UMEA kune kun LSMU, kunlaboras LEJO kaj la Krakova Jagelona universitato. Partopreno povos esti ĉeesta aŭ malĉeesta. Eblas prezenti referaĵon voĉe kaj afiŝe. Okazos ankaŭ konkurso por junaj specialistoj. Jen ligo al la hejmpaĝo: https://lsmu.lt/23-a-internacia-medicinista-esperanto-kongreso/

Ni klopodu, ke esperantistoj ne estu minoritato en la kongreso :-)

Aida Čižikaitė <aiduze@gmail.com>:



## Demandoj al Sean Ó Riain

Jen demandoj, kiujn mi starigis al d-ro Sean Ó Riain dum la lastatempa 14-a MONA-kunveno (10-11 majo 2025). La foto estis farita en 2014 en Krynica, Pollando. La demandoj rilatis al du gravaj aktualaĵoj:

❶ La oficialigo de la angla lingvo en Usono fare de prezidanto Trump kaj ĝia ebla influo al nia movado

❷ La signifoplena elekto de la nova Papo (usonano) ne paroli angle dum sia unua publika apero, sed uzi tri aliajn lingvojn.

D-ro Ó Riain donis pensigajn respondojn al ambaŭ demandoj, kiuj meritas pli vastan atenton inter esperantistoj, precipe nuntempe, kiam lingvopolitikaj decidoj rapide ŝanĝiĝas mondskale. La diskuto estas spektebla ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=90HIthSH2-4&t=13338s

Ahmad Mamduhi

## Plia riĉenhava numero de Internacia Pedagogia Revuo

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI), (p. 3)
Renato Corsetti forpasis (A.R. MAMDUHI, M. D'ONOFRIO, A. MADELLA) (p. 4)
Jozefo HORVATH: Dilemoj de la Esperanta leksikografio en Hungario (p. 10).
Françoise NOIREAU: Distanca Esperanto-kurso (p.17)
Mireille GROSJEAN: Instruado en Afriko – defio kaj evoluo (p. 21)
Claude Gacond kiel pedagogo (Nicole MARGOT, Mireille GROSJEAN) (p. 27)
Lernejoj kaj demokratio (Mireille GROSJEAN) (p. 28)
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, HU) (p. 30)
La 58-a ILEI-kongreso en Beogrado (p. 35)

## Facila brazila espero

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejon uea.facila.org, kiun prizorgas Anna Löwenstein. La artikolon verkis Ursula Grattapaglia kun titolo *La bieno Bona Espero* kaj voĉlegis ĝin Simone Schumacher: https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/kial-burno-r473/

## Esperanto akceptita en eduka revuo

La revuo ALARJ (*Action Learning and Action Research Journal*) akceptis Esperanton kiel unu el la lingvoj almenaŭ por baldaŭa specifa numero. La proponanto estas Azril Bacal,

sveda civitano naskita en Peruo, kiu ricevis la mendon realigi tiun numeron. Kiam Azril redaktos la alvokon, mi kunhavigos ĝin ĉi tie.
https://alarj.alarassociation.org/index.php/alarj

Azril ĵus demandis min, ĉu eblos trovi esperantiston, kiu estu taŭga por la komisiono de la revuo, tiel ke ŝi aŭ li respondecu pri estontaj ricevitaj proponoj Esperante skribitaj. Azril flue parolas la hispanan, la anglan kaj la svedan, sed ne nian komunan lingvon. Vi povas respondi ĉi tie, al mi aŭ rekte al Azril (bazril@gmail.com)

Viko, Civiencia. Esperanta entrepreno por la demokratiigo de la scienco
Universidad de Sevilla (Hispanujo),Université de l'Espoir (DR Kongo)

## Eroŝenko -- valora vivo

Eŭheno Kovtonjuk (UA) prezentis sian prelegon *Valoraĵoj sen daŭro de uzebleco* pri la vivo kaj verkado de la blinda ukrainia esperantisto Vasil Eroŝenko, en la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso okazinta en Sorio majoeke.

## Brno atingos la milon da aliĝoj

En la 19-a de majo aliĝis al la UK 980 personoj el 62 landoj. Elstare: Ĉeĥio 112, Germanio 109, Pollando 97, Francio 79, Hungario 39 kaj Usono 30.

## Plia romano kun historia fono

Mi legis la laŭditan romanon de Anna Löwenstein, temanta pri Julia Agrippina, premiitan per la "Akademia Laŭro" – plene meritite! Inter la multaj temoj de la libro, mi pensis pri tio, kiel antaŭ dumil jaroj la politiko de granda imperio povis dependi de la koruptita karaktero kaj egoismaj kapricoj de unusola ŝtatestro. Nuntempe io tia kompreneble tute ne eblas...

***SMG:*** Ĉu mi detektas ĉi tie guton da ironio?

**Jouko Lindstedt**

========= vortoj: 1438 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.